10e JAARGANG No. 3 VERSCHIJNT MAANDELIJKS 15 MAART 1948

La Progresanto

REDACTIE-COMITÉ
G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per jaar; f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 361133

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

PROBLEMOJ SOLVENDAJ

II

Ni konstatas, ke plurajn mankojn en nia gramatiko oni jam forigis aŭ ĝustigis. Sed tio ne signifas, ke ili solviĝis kontentige. La gramatikistoj kaj aliaj aŭtoroj, kiuj kontribuis al iu solvo, lasis sin gvidi de diversaj faktoroj. Por unuj plej gravas la logika principo; aliaj atribuas pli altan valoron al formoj tradiciaj aŭ de nacia deveno. Kelkaj forĵetas ĉion ne absolute logikan; kontraŭe aliaj konstruas eĉ specialajn regulojn por motivi la tradicie enkondukitajn nekorektaĵojn. Kaj eĉ la logikemuloj ne interkonsentas pri la rolo, kiun ludas la logiko en la lingvo.

El lingvistika vidpunkto tio estas tre interesa kaj studinda fenomeno, sed al la ordinara esperantisto, kiu bezonas ian intelektan apogon, ĝi prezentas nur ĥaosan laboron, en kiu li ne scias trovi la eliron.

Tiu fenomeno havas eĉ danĝeran flankon: tiom longe, kiam iu afero ne estas solvita, ĉiu rajtas uzi tiun formon, kiu ŝajnas al li konvena kaj korekta. Sed apenaŭ iu trovis por si solvon, li tuj deklaras ĝin la sola korekta, kondamnante ĉion, kio ne konformas al lia solvo. Ĉe tio ni pensas ekzemple pri la diskutoj koncerne la modon post „kvazaŭ", kiuj danĝere tendencas al kondamno de la indikativo; pri la kritiko koncerne ajektivon aŭ adverbon en „mi opinias necesa, ke...." k.s.; la instruo, ke post „peti" la prepozicio „al" estas erara; la oftaj harfendaj diskutoj pri la refleksiva pronomo, kiu estas neniam kontentige solvebla; la interliga „a" en „aliafoje" k.s., kiu tre konvenas por konservi la korektan akcenton en tia vorto; la ĝistede ripetita, sed neniam klare argumentita verdikto pri „dum kiam" kaj „ĝis kiam"; la konsterna eldiro, ke la ideo „duona jaro" estas logike neimagebla, do.... erara. En la lasta tempo ankaŭ la vorteto „po" revenis en la fokuson de l' diskutoj: ĉu ĝi estas prepozicio aŭ adverbo. Kaj ni jam antaŭvidas, ke ankaŭ pri tiu temo venos ies persona verdikto: tia ĝi estu kaj ne alia!

Ĉu ni estas sur la ĝusta vojo per tiaj verdiktoj, permesantaj nur tiun solvon, kiun elkovis iu kompetentulo? Ĉu la cetera esperantistaro, ja ankaŭ disponanta pri akrepensaj cerboj, vole nevole rezignu siajn preferatajn formojn nur pro tio, ke anatemis ilin iu sin aŭtoritate esprimanta gramatikisto? Sendube ne!

ĈU NE?

J. van Scheepen.

Door het onlogisch gebruik van woorden en uitdrukkingen in onze nationale talen komen wij er o zo licht toe, deze fouten bij de vertalingen in Esperanto over te nemen. Het burgerrecht, dat zo'n woord of uitdrukking in de nationale taal heeft verkregen, doet ons het onlogische niet eens meer zien. Toch zullen wij ons moeten hoeden tegen een klakkeloos overnemen van dergelijke, niet met het Esperanto in overeenstemming zijnde, idiotismen.

In onze taal en ook in vele andere talen hebben de woordjes „ja" en „neen" een aparte plaats verkregen, niet altijd in overeenstemming met de logica. Vele esperantisten zondigen dan ook door een onjuist gebruik dezer woordjes. Men houde goed voor ogen, dat in Esperanto „jes" een tussenwerpsel is. Een woord dus, dat bij de ontleding van een zin in het geheel geen rol heeft. Gramaticaal behoort het bij geen enkel ander woord van de zin. Uitdrukkingen als: Hij heeft het wel gedaan; waarin „wel" een andere vorm van „ja" is, mogen dus niet vertaald worden met: *Li jes faris tion.* Hier krijgt „jes" de plaats van een bijwoord, wat het evenwel niet is. Daar de zin al bevestigend is, is „jes" geheel overbodig. Wil men speciaal de nadruk op de bevestiging leggen dan kan men eventueel vertalen met „certe": *Li certe faris tion,* of: *Jes, li faris tion.*

„Ne" is een bijwoord en kan dus wel op de plaats staan, die zojuist voor zijn tegenpool werd veroordeeld. Echter vindt men bij „ne" een ander onjuist gebruik! Iemand biedt een vriend een sigaar aan en vraagt: wil je niet eens opsteken? Hij bedoelt echter „wel" opsteken. Men vertale dus niet: *Ĉu vi ne deziras ekbruligi cigaron?,* maar men late „ne" eenvoudig weg. De vriend steekt de sigaar op en zegt: lekker! Waarop als antwoord volgt: ja, vindt je niet? Hij vindt juist van wel. Waartoe dus die ontkenning? *Jes, mi samopinias.* Of: *jes, ĉu?* wat korter is en tevens duidelijk genoeg. Dus niet: *Ĉu ne?* Vele malen hoort men „niet" in de vraag waar juist het tegendeel bedoeld word. Mooi is dat, niet? In Esperanto drukke men de vraag uit door „ĉu", doch de ontkenning late men eenvoudig weg, want die maakt de vraag onlogisch. *Bela estas tio, ĉu?*

Dem.: Mi instruis, ke post „danki" oni uzu „pro". Mi tamen legis, ke Zamenhof uzis „por". Kio estas pli bona?

Resp.: Kutime Zamenhof uzis „danki por", kvankam ekzemploj pri „pro" ne mankas (dankon pro....). Ĝenerale oni opinias, ke „pro" estas pli logika. Ni opinias ambaŭ prepoziciojn uzindaj, sed preferas „pro" pro ĝia ĝeneraleco.

Aŭtoritatulojn sur lingva tereno nia movado ne konas, almenaŭ ne en la senco de diktaroroj, proklamantaj nur la propran volon. Kaj ni ankaŭ ne ŝatas, ke niaj gramatikistoj ludu diktatoron, senkonsidere pri tio, ĉu ilia solvo kontentigas aŭ ne. Ni serĉu vojon alian por veni el la embaraso!

Sed antaŭ ol proponi tian vojon ni konstatu, ke ne ĉiu gramatika elemento postulas rigoran solvon. Kial ni ekzemple nepre agnoskus nur unu modon post „kvazaŭ", deklarante la alian erara? La nuna dumodeco ja permesas pli vastan eblon por esprimi nuancojn de ideoj kaj sentoj! Per tro rigora decido oni katenus la lingvouzadon, malebligante liberan esprimadon de subtilaj ideoj.

Tute alia, tamen, estas la afero, ĉu „po" estas prepozicio aŭ adverbo. Kia ajn estus pri tia temo la findecido, ĝi neniel katenus la lingvon, sed nur kondukus al unuformeco en uzado kaj forigo de multies duboj. Tiom longe, tamen, kiam tiaj aferoj ne estas decide solvitaj, ni rajtas diskuti, proponi, konsili, eĉ instrui, sed certege uzadi tiujn gramatikajn formojn, kiuj ŝajnas al ni korektaj, kondiĉe ke ili ne kontraŭu la fundamentajn regulojn.

La proprajn solvojn ni ne proklamu dogmoj! Severaj en lingvaj principoj ni estu al ni mem; al aliaj ni rajtas kritiki, sed ne malpermesi. Ni agu liberale!

(Finota).

H. Velthove

UIT ALGEBRA EN REKENKUNDE

(Daŭrigo)

Wortel.

Als een gegeven getal in een zeker aantal gelijke factoren ontbonden wordt, dan stelt zo'n factor de **wortel** uit dat getal voor. De n^{de} (ende) machtswortel uit een getal is dus een ander getal, dat, tot de n^{de} macht gebracht het eerste getal oplevert.
Omdat $2^4=16$ is, daarom is 2 de vierdemachtswortel uit 16.

Wortelteken. *)

Het teken $\sqrt{}$, (de eerste letter van het latijnse woord „radix") geplaatst vóór een getal duidt aan, dat de wortel uit dat getal moet worden getrokken.
$\sqrt{a^6}=a^3$.
De wortel uit a tot de zesde is a tot de derde.

Wortelexponent

Het cijfer, dat in het wortelteken staat heet **wortelexponent**. De exponent 2 wordt echter nooit geschreven.

$\sqrt{a}$: de (2e machts)wortel uit a

$\sqrt[3]{a}$: de 3e machtswortel uit a

$\sqrt[m]{a}$: de mde (emde) machtswortel uit a.

Grondtal van de wortel

Het getal, waaruit de wortel getrokken moet worden, heet **grondtal van de wortel.**
$\sqrt[n]{a}$. a is het **grondtal van de wortel.**

Wortelgrootheid

Een getal of vorm, dat (die) vooraf gegaan wordt door een wortelteken heet **wortelgrootheid.**
$\sqrt{(a+b)^2}$ is een wortelgrootheid.

Veelterm

Een**Veelterm** is een getal, waarvan de delen verbonden zijn door + of —.
a+b+c+d is dus een **veelterm** of **vierterm.**

Eenterm

Uit het bovenstaande volgt dus, dat producten, machten, quotienten en wortels **eentermen** zijn.
abc is dus een **eenterm** en abc+xy een **tweeterm.**

*) Pro manko pri la ĝusta signo ni uzas la leteron $\sqrt{}$.

EL ALGEBRO KAJ ARITMETIKO.

Radiko.

Se difinita nombro estas malkomponita je iu kvanto da egalaj faktoroj, tia faktoro estas la **radiko** de tiu nombro. La n^a (noa) radiko de nombro do estas alia nombro, kiu, altigita ĝis la n^a potenco, rezultiĝas la unuan nombron.
Ĉar $2^4=16$ (la kvara potenco de 2 egalas 16), tial 2 estas la kvara radiko de 16 (dekses).

Radika signo.

La signo $\sqrt{}$ (la unua litero de la latina vorto „radix") antaŭ nombro signifas, ke la radiko de ĉi tiu nombro estas difinenda.
$\sqrt{a^6}=^3$. La radiko de la sesa potenco de a estas la tria potenco de a.

Radika indico

La cifero, kiu troviĝas en la radika signo, nomiĝas **radika indico.** La indicon 2 oni tamen neniam skribas.

$\sqrt{a}$: la (2a aŭ kvadrata) radiko de a.

$\sqrt[3]{a}$: la 3a aŭ kuba radiko de a.

$\sqrt[m]{a}$: la ma (moa) radiko de a.

Baza nombro (bazo) de la radiko

La nombro, de kiu la radiko estas difinenda, nomiĝas **bazo de la radiko.**
$\sqrt[n]{a}$. a estas la **bazo de la radiko.**

Radikalo

Nombro aŭ esprimajo, antaŭita de radika signo, nomiĝas **radikalo.**
$\sqrt{(a+b)^2}$ estas radikalo.

Multtermo (polinomo)

Multtermo estas nombro, kies partoj interligiĝas per + aŭ —.
a+b+c+d do estas **multtermo** aŭ **kvartermo.**

Unutermo (monomo)

El la supra klarigo rezultas do, ke produtoj, potencoj, kvocientoj kaj radikoj estas **unutermoj.**
abc do estas **unutermo** kaj abc+xy *) **dutermo** aŭ **binomo.**

*) La prononco de y estas i-greka.

(Finota)

POR KOMENCANTOJ

H. Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactieadres Roelantstraar 4, Amsterdam-W.

DE TIJDEN.

Weinig studerenden zullen moeilijkheden hebben met het gebruik van de tijden van het werkwoord in eenvoudige zinnen als: *La patro estas laca. La patro estis laca. La patro estos laca.*
Het vervoegen, zoals men het veranderen van de werkwoordsvorm noemt, is dan ook heel eenvoudig in Esperanto. Men kan zich wel eens vergissen bij de toekomende tijd, wat dan zijn oorzaak vindt in het Nederlands, omdat onze moedertaal geen eigen werkwoordsvorm heeft om de toekomende tijd te vormen, b.v.: *Ik loop. Ik liep.* Maar *ik zal lopen.* Bij de toekomende tijd roept men dus de hulp in van een ander werkwoord, n.l. *zullen.*
Anders is het bij zinnen als: *Mi diris, ke ke li estas mia patro. Li promesis, ke li vizitos min.;* bij het vertalen van dergelijke zinnen komen veel fouten voor betreffende de tijd van het werkwoord in de bijzinnen: *ke li estas mia patro,* en: *ke li vizitos min.*
De oorzaak hiervan is ook weer het gebruik in het Nederlands, wat uit het volgende zal blijken.

DIRECTE REDE (rekta parolo).

Men spreekt van de directe rede als men iemands of een eigen gezegde, gedachte, veronderstelling, enz. woordelijk weergeeft, b.v.:
Hij zeide: „Ik ben ziek". Ik dacht: „Hij is arm." Men veronderstelde: „Piet komt morgen". In Esperanto: *Li diris: „Mi estas malsana." Mi pensis: „Li estas malriĉa." Oni supozis: „Petro venos morgaŭ".*

INDIRECTE REDE (nerekta parolo).

Men spreekt van de indirecte rede, als men slechts de betekenis hiervan weergeeft, b.v.: *Hij zeide, dat hij ziek was. Ik dacht, dat hij arm was. Men veronderstelde, dat Piet morgen zou komen.* In de beide eerste zinnen vertaalt men maar al te vaak de werkwoorden van de bijzin met een verleden tijd en in de laatste zin soms wel met de voorwaardelijke wijs, wat dan een woordelijke vertaling van het Nederlands is, maar geen correcte vertaling in Esperanto. In Esperanto gebruikt men bij de indirecte rede dezelfde tijd voor het werkwoord als bij de directe rede het geval zou zijn, b.v.: *Li diris, ke li estas malsana. Mi pensis, ke li estas malriĉa. Oni supozis, ke li venos morgaŭ.* Ook bij de volgende werkwoorden kunnen dergelijke gevallen voorkomen: *peti, demandi, scii, aŭdi, konjekti, vidi, skribi, forgesi, deziri, portuli, promesi, aserti,* e.a.
Om de juiste tijd van het werkwoord in bijzinnen die in de indirecte rede staan te gebruiken, vrage men zich slechts af, welke tijd men zou gebruiken bij een directe rede.

Ter vertaling. Opgave 3.

Mijn grootvader zeide, dat hij spoedig zou komen. Johan beweerde, dat zijn hond groter groter was dan de mijne. Moeder dacht, dat vader thuis was. Toen Jan thuis kwam, zag moeder, dat hij gevallen was. De voorzitter stelde voor, dat de vergadering de volgende dag zou plaats vinden. De timmerman vroeg aan zijn knecht, of de kast al klaar was. De knecht beloofde, dat zij voor vijf uur klaar zou zijn. Het bleek, dat hij gelijk had. Ik zag de plaats, waar de man gevallen was. Hij verlangde, dat men de deur sloot.

Vertaling van opgave 1.

La viro, kiun 1) vi ĵus vidis, estas mia frato. Mia filo, kiu tre bone povas lerni, fariĝos 2) instruisto. Unuafoje 3) mi vizitis fremdan landon. La patrino skribis al sia filo tre longan leteron 4). La knaboj kuris en la ĝardenon. Mi konatiĝis 5) kun la profesoro, tre instruita 6) viro. La boato estas longa dek metrojn kaj larĝa du metrojn. En 7) la festo mi renkontis kamaradon N., la sekretarion 8) de sekcio dua. Nur saneco 9) feliĉigas 10) la homon. Mi konsideras hundon fidela amiko 11).

1) Niet: *kiu;* deze zin bestaat uit een hoofdzin: *La viro estas mia frato* en een bijzin: *kiun vi ĵus vidis.* Hoofdzin en bijzin zijn beide zelfstandige zinnen, d.w.z. moeten ieder apart ontleed worden. Men ontleedt de bijzin als volgt: gezegde: *vidis,* onderwerp: vi, bepaling zonder voorzetsel: *kiun,* wat dus moet uitgaan op een N.
2) Niet *fariĝas;* hier is sprake van een toekomende tijd. 3) Ook: *la unuan fojon, je la unua fojo.* Niet: *por...*, *la unuafoje;* het lidwoord kan geen betrekking hebben op een bijwoord. 4) Niet *skribis sian filon tre longan leteron;* hier heeft men te doen met twee bepalingen, waarvan de eerste een voorzetsel eist, omdat er een werkelijk lijdend voorwerp, *tre longan leteron,* in de zin staat. 5) Niet: *interkonatigis;* ten eerste wordt hier met

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het red.-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 4. Vertaal in Esperanto:

Mahatma, „de grote Ziel", zo noemde het millioenenvolk van India de man, die als geen ander heeft bijgedragen tot zijn politiek van ontwaken, die inhoud en richting heeft gegeven aan zijn nationale gevoelens. Die daarenboven steeds er voor heeft gestreden, dat deze gevoelens niet zouden ontaarden in een steriel [1]) nationaal sectarisme, omdat hij niet alleen India, maar veel meer de gehele mensheid wilde dienen. En die de moed heeft gehad een geheel nieuw element in de practische politieke strijd te brengen, het begrip Satyagraha.
Het is niet gemakkelijk een Nederlands equivalent voor dit woord, voor dit begrip te vinden, dat als het ware de kern vormt van Gandhi's politieke activiteit en dat hij zo consequent heeft toegepast, dat hij er zelfs voor bereid was te sterven. Het is niet alleen passieve weerstand, zoals veelal wordt aangenomen, het is meer.

[1]) Onvruchtbaar. Het Vrije Volk.

Vertaling van opgave 1.

Al 1) la malŝatantoj 2) de la tekniko. 3). Mi deziras al neniu 4) ion malbonan, sed en mia indigno 5 pri 6) la multaj skrupuloj 7), kiujn oni esprimas kontraŭ la tekniko, mi diras kelkfoje 8) al mi mem, ke mi kune kun la homoj havantaj 9) ĉi tiujn skrupulojn volus 10) stari sur la komandejo 11) de ŝipo, kiu meze sur 12) la oceano estas 13) en danĝero 14). Tiam kun ironio, kiun ili certe opinius sur malbona loko 15) mi demandus ĉi tiujn homojn 16). ĉu 17) ili deziras 18), ke mi detruu 19) per martelbatoj la radioaparatón, per kiu oni signalas pri helpo.
Ni honore salutu 20) la nelaciĝantajn 21) esploristojn, 22) laborantajn 23) por ni en la laboratorioj kaj en la laborejoj.

H. Dubreuil

1) Dit vertoog is gericht „aan" de verachters. Men kan dus veralen met „al". 2) Ook: *malestimantoj.* 3) Ook: *teĥniko.* 4) Niet: *mi deziras neniun ion malbonan,* daar dan twee komplementen zonder voorzetsel op het werkwoord volgen. 5) *Malico* of *kolero* is reeds te sterk uitgedrukt. Ook: *indignante.* Niet *ĉagreno.* 6) Ook: *pro.* 7) Ook: *malhelpoj, motivoj, kontraŭdiroj.* Niet: *malfacilaĵoj, protestoj.* 8) „Wel eens" heeft de betekenis van: enkele malen. Ook: *iafoje.* 9) Ook: *la homoj, kiuj havas.* 10) Ook: *dezirus.* 11) Niet: *ponto.* 12) Ook: *en, de.* 13) De indirecte rede wordt vertaald met die tijd, welke in de directe rede gebruikt wordt. „Ik zou op een schip willen staan, dat in nood *is*". 14) Ook: *danĝero de pereo.* 15) Ook: *malkonvena.* 16 Ook: *al tiuj homoj, uloj.* 17) Niet: *aŭ.* 18) Zie 13. 19) Na een wens volgt de aanvoegende wijs. Ook: *neniigu.* 20) Niet: *alportu.* Men gaat dit saluut er niet heen dragen! 21) Ook: *nelaciĝeblajn, persist(em)ajn.* 22) Ook: *serĉantoj.* 23 Ook: *esploristojn, kiuj laboras.*

Beoordeling:
Astor: 7.

Dem.: Ĉu la traduko „neresaniĝebla" por „ongeneeslijk" estas bona?

Resp.: Ne. La sufiko „ebl" estas uzebla nur post transitivaj verboj, t.e. verboj, kiuj povas havi objekton. Ĉiuj verboj, kiuj finiĝas per „iĝi", estas *ne*transitivaj, t.e., oni neniam povas diri, ke io estas estata, fariĝata, sidata, resaniĝata k.t.p. „Ebl" do neniam povas esti uzata post tia verbo.
Bona traduko tamen estas „neresanigebla" (= ke kuracisto ne povas resanigi iun). Se oni pensas pri resaniĝo, do sen helpo de kuracisto, oni traduku simple: *li ne povas resaniĝi.*

---

inter bedoeld een handeling die over en weer geschiedt, wat niet mogelijk is na een onderwerp in 't enkelvoud; ten tweede is hier *igi* fout, de betekenis is: *iĝi konata* — een bekende worden. 6) Niet geheel juist zijn: *sperta* d.i. ervaren, *klera* d.i. knap. Ook *scienca;* waar dan een man van de wetenschap mee bedoeld wordt. 7) Niet: *ĉe;* d.i. bij. 8) Niet zonder N; hier heeft men met een bijstelling te doen, die bij een zinsdeel in de vierde naamval behoort. 9) Ook: *bona sanstato.* In: *bonsaneco* is de stam *bon..* overbodig. 10) Ook: *faras la homon feliĉa.* 11) Niet: *kiel fidela amiko;* wel kan men vertalen: *kiel fidelan amikon,* waarmee dan bedoeld wordt: *Mi konsideras lin, kiel mi konsideras fidelan amikon.*

P. W. W. te G., zeer goed. C. v. B. te M, goed. H. J te A., voldoende. Astor, 10. Rana, voldoende. P. M. te Z., 6. M. B. H. 5, volharding wordt beloond. E. R. M. en S., 10.

LA ADVERBOJ EN ESPERANTO

Pri tiuj pleonasmaj formoj ni do konstatas, ke en si mem ili ne havas apartan signifon. Se ili tamen havas signifon, tiun signifon la uzantoj mem metis en ilin. Ĉu pro tio ili estus kondamnindaj, ni ne aŭdacas diri. Esperanto evoluas per la uzado de la esperantistoj. Same kiel en naciaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto la signifo de vortoj povas modifiĝi. Se daŭre oni uzas por apartaj signifoj, veraj aŭ fiktivaj, apartan *e*-formon, tiuj *e*-vortoj akiras pro tio nuancon de signifo, kiun la logiko tamen ne pravigas. Rekomendi tiun uzon ni tamen ne volas.

Ankoraŭ en alia kazo oni aldonas tiun pleonasman *e*. Ni scias, ke ekzistas iaj strangaj, sed konvenaj duoblaĵoj: *plenplene, finfine, ververe* k.s. Kelkaj aŭtoroj emas plivastigi tiun uzadon ankaŭ per aliaj vortoj, inkluzive originalaj adverboj, ĉe kiuj la vorto sen finaĵo *e* sonus iom rigide, neflue: *nurnur*, kaj la sento postulas aldonon de *e*: *nurnure*, *tujtuje*.

Kiel ni jam diris en la komenco, oni konsideras la adverbojn sen *e* kiel originalajn adverbojn. Inter ili ankaŭ: *ankoraŭ, ankaŭ, apenaŭ, almenaŭ, hodiaŭ* k. t.p. Tamen, iam Zamenhof mem diris, ke ilia *aŭ*-finaĵo ne apartenas al la radiko. Tio naskas ion strangan, ĉar kutime oni derivas de tiuj adverboj la adjektivojn *hodiaŭa, morgaŭa* k.s. Se *aŭ* estas forprenebla finaĵo, oni povas same bone diri: *hodia morga, hiera*, ĉar la radikoj ja estas *hodi', morg', hier'*. Rimarkinde estas, ke „Esperantista Akademio" en 1910a permesis anstataŭigi la *aŭ*-finaĵon de tiuj adverboj per *e*, do: *hodie, morge, apene, anke* k. t.p. Kaj eble ankoraŭ pli rimarkinde estas, ke preskaŭ neniam oni uzas tiun permeson, kaj neniu lernolibro ĝin mencias.

La certigo, ke *morg', ank', presk'* k-t.p. estas radikoj, ankaŭ kontraŭas la opinion de tiuj gramatikistoj, kiuj instruas — kiel ni jam menciis — ke la *aŭ*-adverboj povas havi krome *e*-finaĵon. Ja, se korektaj estas *apenaŭ* kaj *apene*, pleonasma estas *apenaŭe*.

Ni menciu ankoraŭ, ke pro neklarigita motivo Zamenhof kreis kelkajn originalajn adverbojn kun forprenebla *e*-finaĵo: *nepre, parkere, ofte, spite, supre, laŭte*. Pri la vorto *spite* kelkaj aŭtoroj opinias, ke ĝi estas prepozicio. Tio ne estas ĝusta. Se estus tiel, ni ne povus derivi el ĝi *spiti, spita* kaj *spito*, ĉar neniu prepozicio havas forpreneblan *e*-finaĵon.

Stranga vorteto estas *po*, kiun Zamenhof evidente opiniis prepozicio kaj ankaŭ traktis ĝin tia. En la praktiko tamen pruviĝas, ke ĝi estas adverbo. La plej bona pruvo pri tio estas, ke *po* estas uzebla ne nur en adjektoj, sed ankaŭ ĉe objekto, kaj eĉ ĉe subjekto, ekz.: „Po kvar personoj sidis ĉirkaŭ la tabletoj".

Specialaĵo de Esperanto estas la direkto-akuzativo aplikebla ĉe adverboj. Kelkokaze oni aplikas ĝin tamen erare. Tiu ĉi akuzativo anstataŭas la prepozicion *al;* ĝi do signifas la samon kiel *al*. El tio rezultas, ke same kiel *al*, ĝi indikas la lokon kien okazas la movo.

Praktike oni tamen vidas ian diferencon inter direkto-akuzativo de substantivo kaj tia akuzativo de adverbo derivita de la sama substantivo, ekz. „iri al la urbo" kaj „iri urben". La formoj *urben, preĝejen, ĉielen, teren* k.s. estas speciale uzataj, por indiki la direkton ien, sen konsidero pri la atingo de la celo. Tiu uzado tamen estas nur fenomena, ne regula.

Ekzistas certaj frazoj, en kiuj esprimiĝas movo, kvankam la adverbo tamen ne indikas la celon de tiu movo, la lokon, kien la movo okazas. En tiaj frazoj oni inklinas uzi akuzativon, tamen tute malĝuste. La adverboj, kiujn oni inklinas tiel uzi erare, estas *plue, ree, returne, renkonte*. Tamen estas facile difineble, ke la akuzativaj formoj *pluen, reen, returnen, renkonten* ne taŭgas, ĉar al frazoj, en kiuj tiaj vortoj estas uzitaj, oni ĉiam povas aldoni la veran lokon kien okazas la movo, ekz.: „Li iris plu (al la urbo). Li iris returne (hejmen). Li iris renkonte (al sia amiko)." Akuzativa adverbo ĉi fraze do estas ne nur nelogika, sed krome pleonasma.

Ankaŭ la vortoj *direkten, tiudirekten* k.s. estas eraraj, ĉar direkto ne estas la celo de iu movo, sed indikas imagatan linion, laŭ kiu oni sin movas al iu celo. Ankaŭ frazojn kun tiuj adverboj oni povas kompletigi per la celo de la movo, ekz.: „Li iras direkte (= en la direkto) al Den Haag."

Dem.: Kiel ni traduku „2/3 deel van een appel", se ni celas per tio ne du trionajn partojn, sed unu parton? Miaopinie la ĝusta traduko estas „du trionoj de pomo".

Resp.: via traduko ne estas malbona, sed ne sufiĉa, ĉar du triono povas esti unu peco, sed ankaŭ 2 pecoj. Plej klara kaj tre simpla estas: „du-triona pomo" (2/3 = du-triona). Komparu: *duona, triona pomo*.

J. Lem.

Opgave 3. Vertaal in Esperanto en leer de woorden die u niet kent.

HET HUIS, WAARIN WIJ WONEN. (Slot)

Op een plank vinden wij geëmailleerde en aluminium pannen *(kaseroloj)*; op een andere plank bussen *(ujoj)* met opschrift: „thee, koffie suiker, zout, peper enz. Aan de muren hangen verschillende voorwerpen: een wasteiltje, een koekepan, een hakbord *(haktabulo)*, een hakmes, een zeef, een trechter, een wandkoffiemolen, grote lepels van verschillende vorm *(kuleregoj diversformaj)*, een rekje *(lataro)* voor hand- en vaatdoeken *(tualet- kaj telertukoj)* enz. In de glazenkast bevinden zich de borden, de schalen, een juskom *(viandsaŭcujo)*, olie- en azijnflessen, busjes voor specerijen *(spicajoj)* enz. In de keuken bevindt zich, evenals in alle andere kamers, electrisch licht. Wij behoeven slechts de schakelaar *(komutilo)* om te draaien om de lamp te doen functionneren. Een stopcontact *(ŝtopkontaktilo)* maakt het ons mogelijk de electrische stroom voor verschillende doeleinden te gebruiken, b.v. voor de stofzuiger *(senpolvigilo, polvosuĉilo)* en de electrische kooktoestellen.

Laten wij nu de slaapkamer binnentreden. Voorheen *(antaŭatempe)* sliep men vaak in een alkoof. Alkoven zijn kleine kamers, die zich tussen de voor- en achterkamer bevinden. Aangezien in een alkoof vensters ontbreken, kunnen daglicht en frisse lucht daarin niet binnendringen. In een alkoof vond men twee, somtijds zelfs meer bedsteden *(litŝrankoj)*. Men vond zelfs bedsteden in de woonkamer. Daar alkoven en bedsteden zeer onhygiënisch zijn, zal men ze in meer moderne huizen tevergeefs zoeken. Moderne huizen bevatten enige slaapkamers met vensters of glazen deuren, waardoor daglicht en frisse lucht vrij kunnen binnenstromen. De ouderwetse *(malmodernaj)* bedsteden heeft men vervangen door ledikanten *(litkadroj)*. Behalve het bed bestaat het meubilair o.a. uit een wastafel *(tualettablo, lavotablo)*, een linnenkast *(tolajŝranko)* en een toiletspiegel. Op de wastafel zien wij een lampetkan *(lavvazo)*, een waskom *(lavopelvo)*, een kammenbakje, een zeepbakje en het scheergerei voor de mannelijke huisgenoten. Op een tafeltje staat het wekkerklokje, dat ons met zijn geklingel *(tindado)* waarschuwt, als het tijd is om op te staan.

(Wordt vervolgd).

Vertaling van opgave 2.

LA DOMO, EN KIU NI LOĜAS.

Ni loĝas en domoj. Pli ofte la domoj estas konstruitaj el brikoj. En la urboj la domoj grandparte konsistas el pli ol unu etaĝo. En ĉiu etaĝo loĝas familio, pro kio unu domo enhavas du, tri aŭ kvar familiojn. La plej malsupran etaĝon ni nomas teretaĝo. Al la teretaĝo ĝenerale apartenas ĝardeno. Ĉiu etaĝo konsistas el: loĝoĉambro, kuirejo kaj unu aŭ pli da dormoĉambroj. Ĉiu ĉambro estas laŭbezone meblita. Nemankipova ejo estas la kuirejo, la laborejo de la dommastrino. Laŭlonge de unu el la flankmuroj ni vidas la kuirejan stablon. La kuireja stablo konsistas el: tabulo, pli ofte farita el artefarita granito. Sub la tabulo troviĝas unu aŭ pli da ŝranketoj. En la tabulo troviĝas baseneto aŭ kavaĵo, per kiu la uzita akvo povas deflui. Oni nomas ĝin la ŝtonlavujo. Pli malpli (iom) stranga nomo, kiu memorigas nin pri la tempo kiam tiu objekto konsistis el kavigita ŝtono, kiu, krom kiel defluilo, utilis ankaŭ kiel lavujo. Super la ŝtonlavujo troviĝas la akvokrano, kiun ni nur bezonas turne malfermi por ricevi (akiri) puran, freŝan akvon. Kelkfoje ni trovas anstataŭ simplan kranon aparaton, kiun nomas akvovarmigilo. En tia aparato la akvo el la (akvo) nikonkilo estas varmigata per elektro aŭ per gaso. Per krano oni povas, laŭdezire, miksi varman akvon kun malvarma akvo, kaj do, laŭprefere, disponi pri varma, varmeta aŭ malvarma akvo. Petrol-, gasaŭ elektraj kuiraparatoj (kuiriloj) ebligas al ni boligi akvon, lakton k.t.p. aŭ kuiri la manĝaĵojn. En kelkaj kuirejoj ni trovas kuirfornon, sed ĝi, almenaŭ en la urboj, pli kaj pli maloftiĝas.

NOMARO DA MALSANOJ EN ESPERANTO

Koncerne la nomaron de malsanoj, aperintan en la januara numero, ni ricevis de niaj legantoj s-ro W. H. Mook en Gr. Kaj k-do Chr. F. W. Slijper en U. kelke da rimarkigoj kaj demandoj, kiujn ni kompreneble unuparte danke akceptas, aliaparte volonte respondos.

Pro manko pri sufiĉa spaco la koncernata listo estis verdire tro konciza kaj pro tio ne sufiĉe klara.

Por korekti kelkajn tradukojn kaj komposterarojn, kaj precipe por respondi la demandojn, ni nepre revenu al la temo en la aprila numero.

ONI DEMANDAS PRI . . .

Dem.: Ĉu la jenaj frazoj ŝajnas al vi ĝustaj: „la amuza estas, ke....; tio ŝajnas pruvi, ke...." Miaopinie ili devus esti: „amuze estas, ke...." kaj „tio ŝajnas pruvo" aŭ „tio ŝajne pruvas".
Resp.: Vi pravas: la formo „la amuza estas, ke...." ne estas konsilinda. „La amuza" (het vermakelijke) ĉi fraze havas substantivan sencon. Anstataŭ „amuza" tamen ĉi kaze ne taŭgas „amuzo", nek „amuzeco". De Saussure iam solvis tiun problemon per substantivigita artikolo: „lo amuza", kiun temon ni jam iam traktis en L.P. Ni preferas „amuze estas, ke...."

Kvankam kelkaj lingvoj permesas uzi infinitivon post kopulativo (schijnt te zijn, blijf zitten), tiu uzo estas nelogika kaj en Esperanto certe ne konsilinda. „Ŝajnas esti" estas eraro, ĝenerale farata pro supraĵa pensado. Korekte oni skribu: „tio ŝajne pruvas" aŭ: „tio ŝajnas pruvo", kaj „restu sidanta".

Dem.: Ĉu s-ro V. pravas, dirante en „Sennaciulo", ke „kiam" signifas logike nur tempopunkton, sed ne tempodaŭron?
Resp.: Sendube ne! Tiu diro pruvas, ke ankaŭ scienculo povas skribi ion ne pensante. Se mi demandas; „Kiam vivis Zamenhof?" mia demando kompreneble koncernas lian tutan vivon: de naskiĝo ĝis morto, kaj certe ne unu tempopunkton!

Dem.: Mi legis la kritikon de s-ro W. en „Sennaciulo" pri „Esperanto 60-jara". Leginte mem la verkon, mi opinias, ke s-ro W. evidente plurloke tute miskomprenis la celon de viaj rimarkigoj pri diversaj aferoj. Ĉu vi bonvolus doni vian opinion pri la kritikitaj notoj?
Resp.: S-ro W. certe ne miskomprenis la celon de mia verketo. Li komprenas ĝin tre bone, sed evidente avide kaptis la bonvenan okazon por venĝi sin pro mia iama recenzo pri „Plena Gramatiko" en L.P. Kiom ajn lerte li maskas sian venĝon, ĝi klare esprimiĝas el la fakto, ke preskaŭ ĉiun temon li tiom tordas, ke ĝi efektive ŝajnas ridiga. Rimarku ekz. liajn intence detaligitajn notojn pri la traduko de Bailey, kiuj impresas la leganton, kvazaŭ mi senreserve aprobas ties lingvan uzadon. Tio estas malvera! Mi konstatis, ke B. *klopodis* imiti la stilon de Zamenhof, sed ne diris, ke li sukcesis en tio!
Simila malsinceraĵo estas la aserto, ke mi „priploras" 83-jarulon tro malfrue mortintan. Ĝuste estas, ke Rollet de l' Isle bedaŭrinde morţis tro malfrue por realigi sian planon koncerne purigadon de nia literaturo. „Tro malfrue" koncernis nur *tiun cirkonstancon*.. Prezenti miajn vortojn kun alia senco estas konscia malvero!
Trompa estas la rezono de W. pri adjektivo aŭ adverbo en frazoj kia „mi opinias *bona*, ke....", el kiu la leganto konkludus, ke mi preferas la adjektivon. Same lia aserto, ke la adverbo en „rajdi sur leono" estas danĝere" estas al mi mistera. Nenie mi diris tion!
Mi povus daŭrigi, ĝustigante ĉiujn ceterajn sencotordojn en lia „recenzo", sed tiuj ĉi sufiĉu. El la tro multvorta „recenzo" pruviĝas nur la jenaj bedaŭrindeaj faktoj:

1e, ke W. oferas sciencan objektivecon al persona venĝemo;

2e, ke por tiom malinda kritiko li ne hezitis makuli laboristan gazeton;

3e, ke li ne havas komprenon pri mia koncepto koncerne la rolon de la logiko en Esperanto;

4e, ke li prezentas siajn proprajn, miaopinie nelogikajn konceptojn pri iaj gramatikaĵoj kvazaŭ leĝon por ni ĉiuj. Kiu objektive legis mian libreton, certe konstatis, ke mi kritikis speciale la trudemon de tiuj aŭtoroj, kiuj sub ŝajnaŭtoritato kredigas al ni la propran pravon; sed cetere mi traktis ĉiujn esprimformojn plejeble liberale. Ni tre bedaŭras, ke recenzoj en la Esperanto-gazetoj (ankaŭ en „Kristana Gazeto" aperis pure subjektiva recenzo) degeneras en nurajn personajn atakojn.

G. J. Degenkamp.

BINDIGO JARKOLEKTO L.P. 1947a.
Kiu deziras bindigi sian jarkolekton, sendu ĝin al ni. Se ni ne bezonas kompletigi ĝin pro mankantaj aŭ difetitaj numeroj, la prezo de bindigo estas f 1.— plus afranko. El eventuala kompletigo rezultos pialtigo de prezo.
Binditajn jarkolektojn ni liveras por f 1.75. Oni atentu, ke la provizo ne estas granda!

Vriendelijk, doch dringend verzoeken wij onze abonné's hun abonnement voor 1948 reeds in de eerste helft van het jaar te voldoen. Dit bespaart ons veel onnodig werk en kosten. Adm.

Ingevolge papiertoewijzing B.P.P. nummer 1160 verschijnt deze uitgave 1× per maand en is de omvang van dit nummer 8 pagina's, formaat 16×24 cm.

KUL